
ISSN 1381-2939

# tejo tutmonde

tutmonda esperantista junulara organizo



# Brikoj de nia TEJO

**PEJ raportas pri agado**

**TEJO-komisiitoj respondas**

**TEJO serĉas volontulon**

*numero 139 (2010:1); jaro 28*



*Karegaj legantoj, en tiu ĉi numero por vi TEJO-Tutmonde intervjuis kelkajn komisiitojn de nia organizo: jen por klarigi al averaĝa membro iliajn taskojn jen por diskonigi agadojn kiuj montriĝas unue esti lokaj sed oni povus adapti ilin ankaŭ en aliaj lokoj aŭ fakoj.*

*Ĝuste pro tio aperas ankaŭ raporto pri la agado de PEJ: la pola junularo lastatempe aktiviĝis kaj aktivigis multajn homojn, sukcese varbas kaj mojose agas. Mi taksas ĝin bona modelo por aliaj feniksaj junularoj kaj pro tio mi kore invitas legi la raporton kaj informiĝi pli ĉe PEJ.*

*TEJO serĉas novan volontulon en la Centra Oficejo en Nederlando. Nepre legu la anoncon, eble vi estos la venonta volontulo!*

*bonan legadon!*
*Nicola*

*Enhavo*


Post-tertrema IJF en norda Italio.........3
PEJ raportas pri agado.........................4
PEJ havas novan estraron..................6
TT intervjuas TEJO-komisiitojn
Jéremie SABIYUMVA............8
Ho-Young SONG...................9
Rodrigo CYRINO..................11
Marek BLAHUŠ....................11
Novaj komitatanoj B..........................13
SES 2010.........................................14
TEJO serĉas volontulon...................15



*TEJO Tutmonde estas dumonata oficiala gazeto de TEJO pri la junulara Esperanto-movado. Ĝin ricevas ĉiuj individuaj membroj kaj patronoj de TEJO. Landaj junularaj Esperanto-organizoj povas ricevi ĝin.*

*Kontribuaĵojn sendu rete al* ***tejo-tutmonde@tejo.org*** *(per normala mesaĝo aŭ kiel kunsendita tekst-dosiero), aŭ paperpoŝte al la adreso: TEJO Tutmonde (Nicola RUGGIERO), Bræðraborgarstígur 55, 101 Reykjavík, Islando. Fotojn/bildojn sendu kiel JPEG.* ***Viaj kontribuaĵoj estas bonvenegaj kaj necesaj!***

*Aliaj Esperanto-gazetoj rajtas republikigi artikolojn el TEJO Tutmonde kondiĉe ke ili mencias la fonton.*

*Redaktisto:* ***Nicola RUGGIERO*** *(Islando). Demandojn pri membrecoj, abonoj, distribuo ktp. sendu al: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; rete: oficejo@tejo.org. Presado: SKONPRES, Bydgoszcz, Polujo; rete: skonpres@poczta.onet.pl.* ***La redaktisto kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.***



ĜD Edukado kaj kulturo
Programo "Junularo en Agado"

***Tiu ĉi eldono estas financita kun subteno de la Eŭropa Komisio. La publikaĵo tamen nur reflektas la vidpunkton de la unuopaj aŭtoroj, kaj la Eŭropa Komisio neniel respondecas pri ajna uzo de la informoj.***

# Post-tertrema IJF en norda Italio

de Manuela Ronco

IJF estas la ĉefa internacia aranĝo de IEJ (Itala Esperanto Junularo), kiu tradicie okazas dum la paska semajno. Post la deviga pasintjara haltigo, kiam la festivalo estis bedaŭrinde nuligita pro la tertremo, ĉi-jare ĝi ree iĝis la kutima amuza kaj interesa renkontiĝo, danke al la bonvolemaj organizantoj kaj al la agrablaj partoprenantoj.

La ejo estis en Roncegno, montara urbeto je la norda flanko de la valo Valsugana, en la regiono Trentino-Supra Adiĝo.

Kiel kutime, partoprenis homoj el malsamaj landoj, junaj aĝe aŭ junaj kore, kiuj renkontiĝis por diskuti la jaran temon, "Kultura tutmondiĝo", sed ĉefe por amikumi kaj amuziĝi uzante Esperanton.

La riĉa taga programo konsistis el prelegoj, diskutrondoj, laborgrupoj. Ekzemple, oni pritraktis historiajn, etikajn kaj politikajn aspektojn de Esperanto, kulturajn diferencojn inter Azio kaj Eŭropo, ĝermanparolantajn malplimultojn en Trentino-Supra Adiĝo, ktp. Sed okazis ankaŭ pli distraj momentoj: la preparado de sangrio, la diskutrondo pri la ĵaluzo, la prelego pri Aikido, tiu pri komiksoj.



Platano (La Pafklik')

Ne mankis kurso de Esperanto por komencantoj, nek de itala lingvo por eksterlandanoj.

La intervenoj estis gvidataj de spertaj esperantistoj, lokaj gastoj aŭ agademaj junuloj kiuj proponis ilian bonvenan kunlaboron.

Du duontagaj ekskursoj okazis tra la ĉirkaŭaĵoj de Roncegno. Krome, estis proponita tut-taga vizito tra la urboj Vicenza, Bassano del Grappa kaj Marostica.

La vespera programo estis vigligita de la koncertoj de aprezindaj muzikistoj kaj grupoj de malsamaj ĝenroj. Ludis Tomio el “La Perdita Generacio”, “Asorti”, Platano el “La Pafklik”, Kim el “Hotel Desperado”, kaj la gitaristoj Hernan Loza kaj François Stride.

Funkciis ankaŭ la bonetosaj noktaj ejoj: trinkejo, diskejo, ludejo kaj gufujo.

Sume, tiu IJF estis sukcesa miksaĵo de amuzo, trankvilumado, kultura interriĉiĝo kaj lernado.

Ĉefe ĝi estis altvalora okazo por renkontiĝi kaj sperti la idealojn de amikeco kaj malsameco-respekto kiuj inspiras la E-movadon.

Certe ĉiuj ĉeestintoj memoros ĝin!



# PEJ raportas pri agado

*Raporto pri agado de la Estraro (oficperiodo 2008-2010)*

de *Łukasz Żebrowski*

**1.Enkonduko**

Laŭ la rezulto de baloto, kiu okazis dum la kunveno en Varsovio la 31-an de majo 2008, la estraron de Pola Esperanto-Junularo eniris Łukasz Żebrowski – prezidanto, Agnieszka Rzetelska – vicprezidantino, Justyna Rusznica – sekretario, Leszek Dobrowolski – kasisto, Łukasz Korczewski – estrarano pri reta agado (rezignis aprile 2009). La raporto prezentas agadon de PEJ dum la dujara oficperiodo de tiu ĉi estraro.

**2.Organizo**

Dum la oficepriodo de la estraro okazis kvar kunvenoj de PEJ, sinsekve en Varsovio, Lodzo, Vroclavo kaj Poznano. Bedaŭrinde aliflanke oni ne sukcesis atingi planitan de la estraro evoluon de loka agado, ekster la nunaj centroj. La estraro dum la sekvonta oficperiodo devus aparte prizorgi tiun aspekton en la evoluo de la organizo.

**3.Kunlaboro kun TEJO kaj PEA**

PEJ estis reprezentata dum ĉiuj kunvenoj de TEJO kaj PEA, kiuj okazis en ĉi tiu tempo. Komitatkunvenoj de TEJO okazis en Szombathely (2008), Liberec' (2009) kaj en Zakopane (2009), kie nian organizon reprezentis Łukasz Żebrowski. Dum la komitatkunveno de TEJO en Liberec' estis elektita nova sespersona estraro de la organizo, kiun eniris eĉ tri membroj de PEJ (Oleksandra Kovyazina, Irmina Szustak, Łukasz Żebrowski). Pro tio la funkcion de komitatano A en TEJO por PEJ Łukasz Żebrowski transdonis al Agnieszka Rzetelska.
Dum la Kunveno de Delegitoj de PEA en Lodzo (2008) nian organizon reprezentis Łukasz Żebrowski.

**4.Internacia Junulara Kongreso 2009**

La plej granda projekto de PEJ dum ĉi oficperiodo de la estraro estis la Internacia Junulara Kongreso (IJK), organizita kune fare de Ĉeĥa, Germana kaj Pola Esperanto-Junularoj.
La eventon en Liberec' (Ĉeĥio) partoprenis ĉirkaŭ 350 homoj, kaj en la organiza teamo plej multis poloj.

**5.Ago-Semajno**

Jarŝanĝe 2008/2009 en Liptovský Mikuláš (Slovakio) okazis la lasta aranĝo el la serio Ago-Semajno.
Ĝi estis organizita de PEJ, SKEJ (Slovakia Esperanta Junularo), la klubo Varsovia Vento kaj LEK (Liptova Esperanto-Klubo).

**6.Junulara E-Semajno**

Jaron poste la unuan fojon okazis Junulara E-Semajno, do aranĝo kiu kreiĝis dank' al kuniĝo de Ago-Semajno kaj Internacia Seminario organizita de Germana Esperanto-Junularo. La eventon partoprenis pli ol 200 homoj el la tuta Eŭropo. La sekvan aranĝon el la serio Junulara E-Semajno ni kune organizos en la germana urbo Burg (Spreewald).

**7.Seminario de PEJ kaj E@I**

PEJ, kune kun E@I, planis organizi seminarion „Multimedieco por multlingveco kaj multkultureco”. La projekto preparita ankoraŭ de la antaŭa estraro estis korektita kaj refoje prezentita al la fonduso de la Eŭropa Komisiono „Junularo en agado”. Bedaŭrinde la duan fojon ĝi ne estis akceptita de la fonduso kaj ni ne sukcesis realigi la seminarion.

**8.Ekonomia Forumo**

PEJ-membroj Agnieszka Mozer, Tobiasz Kaźmierski kaj Łukasz Żebrowski jam tradicie prizorgis Esperanto standon dum la 17-a Ekonomia Forumo en Krynica (2008).

**9.Scienca Pikniko**

Esperanto estis prezentata ankaŭ ĉe la stando de PEA dum la 13-a Scienca Pikniko en Varsovio. Krom informado al vizitantoj, okazis tie ankaŭ mallongaj lecionoj de Esperanto kaj prezentoj de la filmoj el la serio „Esperanto estas…”.

**10.Scienca Festivalo**

Dum la varsovia Scienca Festivalo, PEJ kune kun la Historia Muzeo de Polaj Judoj organizis 4-tagajn laborrenkontojn por lernejoj „Grafitio esperante”, dum kiuj la partoprenantoj, forme de ludo, konatiĝis kun la ideoj de Esperanto kaj kun la bazo de la lingvo.



**11.Jubileo de Zamenhof**

Por la 150-a naskiĝdatreveno de Zamenhof, PEJ kune kun Historia Muzeo de Polaj Judoj kaj kuratorino Natalia Romik preparis ŝanĝon de etikedoj de polaj al esperantaj en vendejoj de varsovia kvartalo Muranów, proksime de la loko en kiu loĝis Zamenhof. La evento vaste eĥis en polaj kaj internaciaj amaskomunikiloj.

**12.Eldonaĵoj**

Preparita jam antaŭ kelkaj jaroj T-ĉemizo „Lingva Revolucio” estis aparte sukcesa, do post ĝia elĉerpiĝo ni eldonis ĝin jam la trian fojon, ĉi-foje en diversaj koloroj, en kvanto de 200 ekzempleroj.
Okaze de la IJK en Liberec', en kvanto de 100 ekzempleroj estis eldonita T-ĉemizo kun la emblemo de la kongreso.




La kolekto de esperantaĵoj eldonataj de PEJ pliriĉiĝis je botelmalfermilo „Esperanto – Probably the best language in the world". Ĝi estis eldonita en kvanto de 200 ekzempleroj.
Krome PEJ organizis konkurson pri fotoj kun niaj produktoj. Rezulto de la konkurso estos anoncita junie 2010.

**13.Bildo de la organizo**

Dum ĉi tiu oficperiodo estis faritaj fundamentaj ŝanĝoj en informado pri nia agado ene de nia organizo kaj ekster ĝi. La plej grava parto de la rekonstruo estas kompreneble nova paĝaro, dulingva, kun multaj informoj kaj ofte aktualigata. Diskutgrupo estis ŝovita al servoj de google. PEJ aperas en ĉiuj plej gravaj sociaj paĝaroj, kaj informoj pri nia agado regule aperas en la plej gravaj esperantistaj amaskomunikiloj.

# PEJ havas novan estraron

En la printempe verda, nordorienta kvartalo de Varsovio, trideko da partoprenantoj pasigis semajnfinon dum la kunveno de Pola Esperanto-Junularo. La aranĝo okazis inter la 30-a de aprilo kaj 3-a de majo kaj ĝia ĉefa celo estis elekto de estraro por la venontaj du jaroj.

La kunveno komenciĝis jam vendrede, per neformala kradrostado. Oficiala programo ekis la sekvan tagon kaj inaŭguris ĝin Łukasz Żebrowski per raporto pri agado de la estraro en la oficperiodo 2008-2010. En tiu tempo PEJ realigis kelkajn grandajn projektojn, el kiuj unuavice menciindas Internacia Junulara Kongreso 2009 organizita kune kun Ĉeĥa kaj Germana Esperanto-Junularoj en Liberec'. Same gravis fondo de nova aranĝo – Junulara E-Semajno, kiu kreiĝis dank' al kuniĝo de novjaraj Ago-Semajno (de PEJ kaj Varsovia Vento) kaj Internacia Seminario (de GEJ). Atenton meritas ankaŭ furoraj esperantaĵoj eldonitaj de PEJ: T-ĉemizo „Lingva revolucio" kaj botelmalfermilo „Esperanto – Probably the best language in the world". Bedaŭrinde ne ĉio iris tiom bone, kiel estis planite kaj la sekva estraro devos doni apartan atenton al kampo de loka agado.

Religon de tiu kaj aliaj taskoj prenis sur sin ses estraranoj elektitaj fare de la komitato. Prezidantino fariĝis Agnieszka Rzetelska, kiu en la antaŭa estraro rolis


*Programero dum la PEJ-kunveno*

kiel vicprezidantino. Ĝisnuna prezidanto, Łukasz Żebrowski prizorgos informadan kampon. El la antaŭa estraro restis ankaŭ Leszek Dobrowolski, kiu daŭre estos kasisto de PEJ. Tute novaj estraranoj estas Zuzanna Samborska (vicprezidantino) kaj Natalia Antolak (sekretario). Fine, pri landa agado respondecos Przemek Wierzbowski, kiu jam estis estrarano de PEJ en jaroj 2006-2008. La estraron membras do egale tri viroj kaj virinoj, kaj same poduone novaj kaj plu oficantaj aktivuloj.

Dum la kunveno okazis ankaŭ du programeroj dediĉitaj al Junulara E-Semajno. Unua celis prezenti organizan flankon de JES al tiuj, kiuj ankoraŭ ne membras en la teamo. Dua estis kutima laborkunsido de la organiza komitato.

Krome dum la kunveno oni klopodis krei ideojn por ŝanĝi emblemon de PEJ. Tio ĉi estis realigita per preparado de grafitiaj ŝablonoj. La programero, krom multo da amuzo, donis ankaŭ konkretajn rezultojn, kiuj estos plu evoluataj.

Trairante al la distra parto de la kunveno, ne eblas ne mencii oficialan debuton de la varsovia kabaredo „La oraj pantalonoj en arbustoj”. Tiu ĉi nova grupo prezentis skeĉojn en Esperanto kaj en la pola. Ĉiuj vesperoj finiĝis per etosplena kradrostado en verdejo de Varsovia Vento.

Fotojn de la kunveno kaj ankaŭ pli detalajn raportojn pri la renkontiĝo kaj pri agado de PEJ dum la lastaj du jaroj eblas trovi en la paĝaro de la organizo ĉe http://pej.pl

## Gajnintoj de la konkurso 'Partoprenu IJK-n'

TEJO disponigis 1500 eŭrojn por la konkurso. Ĉi-foje la prijuĝo estis aparte malfacila pro la kvalito de la kandidatiĝoj kaj la nombro da partoprenantoj. La jenaj partoprenantoj ricevos partan repagon de siaj kotizoj al IJK en Kubo kaj/aŭ vojaĝkostoj:




- s-ino **Luana Araújo de França** el Brazilo. Ŝi ankoraŭ neniam partoprenis en IJK sed estas vic-prezidanto de regiona asocio en Brazilo kaj jam kunorganizis regionan esperantan aranĝon.
- s-ino **Tina Tišljar** el Kroatio – Tina estas aktiva en la Kroata Esperanto-Junulara Asocio, kunorganizas kaj ĉeforganizis MIROn en Kroatio. Ŝi jam kelkfoje partoprenis en IJK kaj ĉiam ŝia helpo estis tre rimarkinda.
- s-ro **Roger Gotardi** el Brazilo. Roger aktivas en BEJO kaj regiona brazilo asocio, kaj aldone laboras por la revuo La Karavelo. Li neniam antaŭe partoprenis en IJK.

La kandidatoj estis prijuĝitaj laŭ aktiveco, motiveco kaj taŭgeco de ilia partopreno al la programo de IJK. Ni gratulas ilin kaj ankaŭ salutas la malvenkintojn, ĉar multaj el ili ankaŭ meritis akiri la subvencion.

# TEJO-Tutmonde renkontas komisiitojn

*Por konigi al la membraro la komisiitojn kiuj plenumas laboron en tre difinita kampo, la redakcio decidis intervjui ilin.*

## Jérémie SABIYUMVA

*Komisiito pri Landa Agado en Afriko*



TT: Saluton Jérémie! Vi estas komisiito de TEJO pri Landa Agado en Afriko. Pri kio temas viaj taskoj?

Jérémie SABIYUMVA: Miaj taskoj konsistas el instigado al junuloj plifortigi sialandan movadon, verki artikolojn por la organoj de TEJO, starigi junularajn organizojn kaj eĉ sekciigi (aŭ aligi) ilin al TEJO, kunlabori kun TEJO, informi junulojn pri TEJO kaj diversaj faritaj decidoj, diskuti kun junularaj organizoj pri farendaĵoj...

TT: Ĉu vi planas seminariojn aŭ renkontiĝojn kiuj celas junulojn de najbaraj landoj?

JS: Seminarioj aŭ renkontiĝoj estas tre gravaj, sed pro financkapablo de niaj junuloj ni ne povas ilin organizi. Nia movado dependas de subvencioj de UEA kaj aliaj donacantoj, kaj ĉi-jare vidiĝas ke ne estas multaj donacemuloj. Organizi renkontiĝojn aŭ seminariojn postulas ambaŭflanke (por organizantoj kaj partoprenantoj) rimedon kaj en kazo de Afriko la afero ne estas simpla.
Landskale, ni klopodas fari ion por junuloj dum naciaj kongresoj aŭ seminarioj aŭ aranĝoj. Ekzemple dum la dua nacia kongreso de Esperanto en Burundo, ni provis inviti junulojn de Tanzanio kaj de Kongo (je la limregionoj). Ni petis al nia asocio disponigi manĝaĵojn kaj loĝejon senpage, bedaŭrinde ili ne sukcesis ĉeesti. Ni tamen faris ion por junuloj kiuj partoprenis kaj ni klopodos disvastigi ĉi strategion en aliaj landoj.

TT: Ĉu vi havas malfacilaĵojn plenumi vian taskon? Se jes, kiuj estas tiuj obstakloj?

JS: Jes. Por atingi junulojn mi devas uzi la solan kanalon t.e. la reta diskutlisto, sed la problemo estas ke, ĝis nun, interreto estas grandparte nur en ĉefurboj kaj esperanto plifortas en vilaĝoj kaj en malgrandaj urboj. Alia problemo estas ke eĉ tiuj retkafejoj de la ĉefurbo estas tre multekosta; kompreneblas ke junuloj, kiuj ankoraŭ finance dependas de gepatroj ne kapablos regule viziti la retkafejon. Estas ankaŭ problemo pri la ne-sci-uzo pri komputiloj.

Alia problemo estas ke estraroj de asocioj ne bone kunlaboras, kiam ni petas informon de ili; kelkaj eĉ ne respondas, aliaj nur promesas respondi. Ekzemple, mi sendis mesaĝojn al landaj asocioj petante

adresojn de aktivaj junuloj, por helpi ilin starigi junularajn organizojn, sed nur kelkaj reagis.

TT: Rakontu vian sekretan revon rilate al via agado :-)

JS: Mi volas plifortigi la movadon en Afriko, kaj eĉ en landoj kie ĝi ne ankoraŭ ekzistas por ke en venontaj jaroj ni ankaŭ gastigu UK-n, IJK-n kaj aliajn gravajn aranĝojn. Nun Afriko progresas socie, necesas ke ĝi ankaŭ progresu kun Esperanto. Estas nia tasko klopodi fari ion, ĉar la estonteco de Esperanto en nia kontinento dependas unue de junuloj.

## Ho-Young SONG

*Komisiito pri Landa Agado en Azio*



TT: Saluton Ho-Young! Vi estas komisiito de TEJO pri Landa Agado en Azio. Pri kio temas viaj taskoj?

SONG Ho-Young: En la regularo de TEJO, la rajto kaj la elekto de mia posteno estas relative bone eksplicitaj, sed mencio pri la rolo ne sufiĉas laŭ mi. Mi en 2008 transprenis la komisiitecon de ZHU Xin el Ĉinio, sed mi ne povis havi bonan kontakton kun li, do mi kvazaŭ memlernis kion fari kiel funkciulo, iel memkonstruante difinon de la posteno. Mi tamen povas diri: la TEJO-estraro havas vicprezidanton pri landa agado, kiu nun estas Irmina SZUSTAK, sed ŝi bezonas kunlaboron kun lokaj aktivuloj. Do mia ĉefa tasko estas helpi ŝin pri informado kaj komunikado, ligante la Estraron kun aziaj landaj sekcioj (aŭ ne-sekcioj), kiuj ofte iĝas izolitaj for de TEJO. Mi instigas aziajn junularojn informi TEJO-on pri sia aktiveco kaj fariĝi aktiva ankaŭ kadre de TEJO.

Memkompreneble, mi helpas ankaŭ inter aziaj junularoj. Laborante kiel prezidanto de Korea Esperanto-Junularo (KEJ) inter 2008 kaj 2010, mi profunde ekbezonis kontakton kaj interstimuladon inter landaj junularoj por komuna progreso. La historio jam bone montras: en 1970-aj kaj 1980-aj jaroj abundis t.n. "Esperanto-rondoj" en Koreio, sed multaj el ili iompostiome okupiĝis nur pri siaj internaj aferoj mem aŭ koncentriĝis nur pri devojiĝintaj diskutoj rilataj al filozofia aŭ sociologia senco de Esperanto. Ili ne parolis en Esperanto, sed parolis pri Esperanto perdante sian propran identecon, kaj fine diskolapsis aŭ iĝis "grupoj celantaj simplan amikumadon sen Esperanto". Mi lernis, ke la sama rezulto povas okazi ĉe landa junularo sen intencaj kaj regulaj kontaktoj kun alilandaj junularoj. Tial mi pensas tion ĉi ne malpli grava ol la supra.

TT: Ĉu vi planas seminariojn au renkontiĝojn kiuj celas junulojn de najbaraj landoj?

SHY: Mia klopodo ofte enfokusiĝas pri

sukceso de Komuna Seminario, efektive ununura junulara internacia aranĝo en Orienta Azio. (Sed neignoreble, ke nuntempe burĝonas etaj similaj renkontiĝoj kiel Junulara Seminario en Ĉinio kaj Junulara Renkontiĝo inter Oomoto kaj Ŭonbulismo). Ludante rolon kiel tiun de JES en Eŭropo, ĝi kutime okazas alterne en Koreio, Japanio kaj Ĉinio ekde 1982. En 2009, dum mia prezidanteco de KEJ, mi proponis al Vjetnama Esperantista Junulara Organizo (VEJO) okazigi ekstran KS-on feste al jarmiliĝo de la urbo Hanojo, ne nur por plivastigi ĝian sferon, sed ankaŭ por porti al ĝi freŝan venton. Jam aperis anonco, ke ĝi okazos ekde la 18a ĝis la 20a de decembro ĉi-jare en Hanojo, Vjetnamio, kun la temo "Komunikiloj inter junaj esperantistoj".

TT: Ĉu vi havas malfacilaĵojn plenumi vian taskon? Se jes, kiuj estas tiuj obstakloj?

SHY: La malfacilaĵoj ne estas tre aliaj ol tiuj de junulara movado ĝenerale. Junuloj baldaŭ iĝas eksjunuloj, do ĉiam ne sufiĉas homoj, kiuj povas kunlabori seninterrompe por gravaj taskoj. Foje fortiĝi kaj foje malfortiĝi kvazaŭ ondo estus neevitebla sorto de junulara movado, sed manko de oportuno transdoni sperton kaj scion de antaŭulo al posteulo estas des pli grava problemo en Azio ol en Eŭropo, laŭ mia impreso. Alia "azia" problemo estas ke ĉi tie landoj ne estas bone ligitaj per surteraj vetureblecoj kiel en Eŭropo. Japanio estas insularo, Sud-Koreio estas kvazaŭinsulo pro bloko de Nord-Koreio, Ĉinio estas tre vasta, kaj Vjetnamio estas for de tie, kie aktivas ĉinaj esperantistoj, kvankam ĝi najbaras kun Ĉinio. Do, oni devas utiligi precipe aviadilon aŭ malpli ofte ŝipon, kio signifas plian koston por partopreno en alilandaj E-renkontiĝoj. Unu fojon en 2009 KS povis gajni subvencion de Komisiono de UEA pri Azia Esperanto-Movado (KAEM) por partoprenigi du junulojn el Vjetnamio, sed tio ne estas ĉiam konkretigebla. Necesas starigi regulan konkurson kiel "Partoprenu IJK-on" de TEJO per kontribuo de patronoj.

TT: Rakontu vian sekretan revon rilate al via agado :-)

SHY: Ha, kutime mi ne havas sekreton :-). Se mi havas novan ideon, mi tuj dividas ĝin kun gekolegoj, demandante ilian opinion. Unu el miaj revoj estas plistabiligi situacion en mia laboro kaj trovi alian junulon kiu povas transpreni mian postenon. Ĉar pli kaj pli proksimiĝas mia diplomiĝo, kiu premas min kun pli serioza bezono de studo.
Mi kredas, ne ke kompetentulo plenumas taskojn, sed ke taskoj igas la ulon kompetenta. Eĉ mi, kiu ne havis proksiman modelon en la laboro, povis labori lernante kaj lerni laborante. Mi deziras, ke aperu pli da kuraĝuloj (aŭ eĉ aŭdaculoj) en nia movado, kaj antaŭenigu ĉion en ĉiuj sencoj.

**Puŝetu nin en Facebook**
http://tinyurl.com/TT-en-facebook
**Sekvu niajn pepojn en Twitter**
http://tinyurl.com/TT-en-twitter

## Rodrigo CYRINO

*Komisiito pri Landa Agado en Ameriko*



TT: Saluton Rodrigo! Vi estas komisiito de TEJO pri Landa Agado en Ameriko. Pri kio temas viaj taskoj?

Rodrigo CYRINO: Saluton, TT! Ameriko estas granda(j) kaj vasta(j) kontinento(j), tial mi kaj multaj junuloj estas solaj en propraj urboj, tial gravas kontaktiĝi kun ili. Mi mem - kiel loĝanto de Amazonio - sentas tiun solecon kiu ofte volas malesperantistigi nin. Jen kiam mi aperas; kiel peranto de TEJO, por ke ni sukcese kapablu aranĝi la movadon (eĉ se disde).

TT: Ĉu vi planas seminariojn aŭ renkontiĝojn kiuj celas junulojn de najbaraj landoj?

RC: Jes, kompreneble. Nun, mi klopodas vigligi la Amazonian movadon, sed nun, kun pli da tempo, mi klopodos helpi aliajn, ĉar landemo nur endanĝerigas la movadon, tia interlanda (aŭ kromlanda) movado nur riĉigas kaj vigligas la movadon.

TT: Ĉu vi havas malfacilaĵojn plenumi vian taskon? Se jes, kiuj estas tiuj obstakloj?

RC: La unua, sendube estu la malproksimeco. Due, rimarkindas ke junuloj - en Ameriko - ofte kaj studas kaj laboras, tial apenaŭ restas tempon por E-laboroj. Gravas ke TEJO pli kaj plu vojaĝigu la aktivulojn, ne nur al kongresoj, sed al la kutima movada etoso, ĉar nur tiel ni ja sukcesos kunigi la junularon kaj vivigi la junan kutiman emon ke alia mondo eblas.

TT: Rakontu vian sekretan revon rilate al via agado :-)

RC: Mi revas pri la tago kiam junuloj en Ameriko pli facile povu renkontiĝi kun e-parolantoj ni diru "surstrate"... Al multaj enlandaj movadoj mankas tiu vivsperto...

## Marek BLAHUŠ

*Komisiito pri Reta Agado*



TT: Saluton Marek! Vi estas komisiito de TEJO pri Reta Agado. Pri kio temas viaj taskoj?

Marek BLAHUŠ: Mi respondecas pri la reta ĉeesto de TEJO, precipe pri ties teĥnika fono. Ekde la apero de Pasporta Servo 2.0, TEJO posedas propran virtualan servilon en Usono kie gastas la retregionoj pasportaservo.org kaj tejo.org. Pasporta Servo estas administrata per aparta teamo, mi do okupiĝas precipe pri la retejo de TEJO. Mia tasko estas certigi glatan funkciadon de la paĝaro kaj retpoŝto, kaj parte ankaŭ efektiva programado. Tial mi ekzemple kreis retpaĝaron pri la 66a IJK en Kubo kaj ankaŭ programis la aliĝilon por ĝi. Dum tio mi devis komuniki kun la Estraro

kaj LKK, kaj nun mi plu fojfoje aldonas ion kaj kontrolas la alvenantajn aliĝojn. Tamen la tuta paĝaro estas vikia, do etajn ŝanĝojn povas fari ankaŭ la organizantoj mem. Mi ankaŭ administras la retpoŝton kaj scias do ekzemple starigi plusendan adreson @tejo.org aŭ ŝanĝi ĝin kiam iu raportas problemon. Iom aldone al miaj ĉefaj taskoj mi ŝatas okupiĝi pri serĉado de valoraj informoj rilataj al la historio de TEJO, ĉar pro la kreskanta uzo de informteknologioj la fizika TEJO-arĥivo dum lastaj jaroj ricevas signife malpli da kontribuaĵoj. Tial mi ekzemple ĉe www.tejo.org/ijk kreis liston de paĝaroj de ĉiuj IJK-j ekde 1999.

TT: Ĉu vi havas malfacilaĵojn plenumi vian taskon? Se jes, kiuj estas tiuj obstakloj?

MB: Mi ja estas studento de informadiko, do konas la fakon, kvankam pri retejestrado mi laste pli vaste okupiĝis antaŭ 5 jaroj. Ekde tiam mi specialiĝas pri komputila lingvistiko, kiu ankaŭ estas la temo de miaj studoj. Ekzemple mi apenaŭ lertas pri grafiko, pro kio mi ĉiam bonvenigas aliulan helpon. La aspekton de la IJK-retpaĝaro prizorgis mia helpanto Joop Kiefte, kiu adaptis ĝin laŭ libera aspekto el interreta datumbazo. Mi tamen ŝatas enprofundiĝi en la servilon de TEJO, ĉar ĝi estas riĉa kolekto de buntaj datumoj kaj programoj produktitaj dum la jaroj de diversaj aktivuloj el malsamaj landoj, reflektanta la rapidan ŝanĝiĝadon de personoj en la estraj postenoj de la organizo. Tiu riĉeco foje emas simili al ĥaoso, kiam evidentiĝas ke TEJO de pluraj jaroj gastigas retpaĝaron de iu sia neforta Landa Sekcio, sed neniu scias diri ĉu ĝi estas plu uzata kaj ne facilas identigi taŭgan respondeculon el tiu lando. Tial, kaj ĉar hodiaŭ jam proponoj de senpagaj regastejoj multas, mi preferas iom post iom lasi en la servilo nur datumojn rekte rilatajn al TEJO - tio estas precipe la paĝaro (kies fortikeco foje malhelpas starigon de aliaj servoj), sed ankaŭ kelkaj vikioj (estrara kaj publika kiu suferas atakojn de spamistoj), plej diversaj dokumentoj el la moderna historio de la organizo, kaj ankaŭ la jam menciitaj retpoŝto kaj IJK-paĝaroj. Precipe komence, dum la transiro al la nova servilo, tre multe helpis min kun ordigado la tiama TEJO-volontulo Paŭlo Ebermann - de la servilo ja dependas multaj personoj kaj Paŭlo aparte bone sciis kion necesas kiel aranĝi por ke ĉio rapide refunkciu.

TT: Rakontu vian sekretan revon rilate al via agado :-)

MB: Kompreneble, ĉefe ĉar mi faras la tuton volontule kaj, krom ĝi, okupiĝas pri pluraj aliaj aferoj (mi aldone aktivas en E@I kaj ankaŭ partoprenas kelkajn sciencajn kaj komercetajn projektojn kiuj parte vivtenigas min), mi tre ŝatus ke la tuta retejo daŭre funkciu senerare kaj ke ĉiujn taskojn la uzantoj sciu faradi senpere, tiel ke mi povu nur kun kontento observi ĝin demalantaŭe. Tio ja parte jam nun estas tiel, ekzemple ĉar ni uzas vikiojn kaj enhavmastrumajn sistemojn, kaj ĉar ni bonŝance nur malofte estas trafataj de paneoj, atakoj kaj similaj malagrablaĵoj.
Espereble do ĉio plu restos almenaŭ same bona kiel nun kaj mi plu povos plene koncentri min dum mia laboro al plia utiligado de miaj kapabloj serve al la membroj de TEJO.

# TEJO havas novajn Komitatanojn B!

*En la oficperiodo 2010-2012, TEJO havos du Komitatanojn B: Michael Boris MANDIROLA el Italujo kaj Guy JOHNSTON el Britujo.*
*Alvenis du validaj kandidatiĝoj por la posteno de Komitatano B, kaj ĉar tio estas malpli ol kvin, kiom oni rajtas havi laŭstatute, elektoj ne okazas kaj ambaŭ kandidatoj aŭtomate iĝas Komitatanoj B.*
*Tiuj ĉi reprezentantoj de la individuaj membroj de TEJO ekoficos kun la resto de la Komitato ekde la 1a de Junio 2010.*

*Jen mallongaj sinprezentoj de la du novaj komitatanoj. Al ambaŭ TEJO-Tutmonde deziras fruktodonan laboron!*

## Guy JOHNSTON

*guydjohnston@googlemail.com*



Mi naskiĝis en 1987 en sudorienta Anglio, sed mi ĵus ekloĝis en Bjalistoko, Pollando, kie mi restos dum preskaŭ unu jaro. Mi laboras ĉi tie kiel volontulo en la Bjalistoka Esperanto-Societo, kadre de la Eŭropa Volontula Servo, kiu estas projekto de la EU.
Mi diplomiĝis pasintjare pri meĥanika inĝenierarto, kaj laboron en tiu profesio mi planas komenci post mia volontula servo.
Mi lernis Esperanton en 2008 per la interreto. Mia plej ŝatata ĝuaĵo krom paroli Esperanton kaj membri en ĝia parolkomunumo estas ĉeesti la grandajn internaciajn junularajn renkontiĝojn, kie mi ĉiam konatiĝas kun multaj novaj, tre afablaj homoj de multaj diversaj landoj. Krom Esperanto, mia ĉefa ŝatokupo estas muziko, kaj mi ludas gitaron en rokbando en Britio.

## Michael Boris MANDIROLA

*giodezo@tin.it*



Loĝloko: Torino
Naskiĝjaro: 1988
Profesio/studfako/vivokupo: Komputil-inĝenier-studento.
Ĉefaj aktivaĵoj/interesoj en la Movado: organizado de renkontiĝoj, rilatoj kun neesperantistaj instancoj, informado en junularaj medioj, instruado.
Ŝatokupoj: krom en Esperantujo mi estas aktiva en internacia teknologistudenta asocio. Krome mi tre ŝatas vojaĝi, legi, retumi, aŭskulti muzikon ktp.
Vivdevizo: Optimismu!


***La Komitato de TEJO renoviĝis kaj ni konigos al vi la novajn komitatanojn en la venontaj numeroj!***

# SES 2010

*Somera Esperanto-Studado (SES-2010) okazos inter la 2-a kaj la 10-a de julio 2010.*



Jam la tria fizika lernu!-renkontiĝo okazos en okcidentslovaka banurbo Piešťany, situanta 80 km for de la slovaka ĉefurbo Bratislava kaj 160 km de Vieno, ĉefurbo de Aŭstrio.
La programo konsistos el kelkaj partoj:
Antaŭtagmeze: instruado pri Esperanto;
Posttagmeze: ekskursoj, prelegoj, manlaboroj, sportoj, laborgrupoj, ktp.;
Vespere: Nacia kaj Internacia Vesperoj, koncertoj, filmo-spektado, diskoteko...
Esperanto-instruadon gvidos spertaj Esperanto-instruistoj en 4 grupoj, laŭ la lingvo-nivelo.
Pri la lernu!-programeroj zorgos lernu!-teamo. Eblos ĉeesti prezenton pri lernu.net, pri la traduk-sistemo de la paĝaro k.s. Vi estos bonvena iam ajn demandi aŭ proponi ion ajn, rilate al la paĝaro.
**Novaĵoj por 2010:**
- **"Flugiloj de malfacila vento"** - okazos seminario por instruemuloj! Ĉiujn instruemajn esperantistojn kun relative bona E-nivelo (B1-C1) ni invitas ĉeesti la porinstruistan seminarion, sub la gvido de ILEI-spertuloj. La "Flugiloj"-seminarioj okazas jam ekde la jaro 2003, enkadre de E-aranĝoj (pli da detaloj troviĝas en la parto Instruado).
- **Ekzamenoj de UEA laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER)**: B1, B2, C1. Eluzu raran eblon ekzameniĝi pri via Esperanto-scio, laŭ la nova komuna eŭropa referenckadro pri lingvoj (detalojn pri la KER-ekzamenoj vidu ĉe Instruado).
- **Seminario de TEJO "Instigi Kreemon"** - tiu ĉi aktivula trejnado celos instigi freŝan pensmanieron kaj krei novajn ideojn aŭ projektojn (pliajn detalojn vidu ĉe Instigi Kreemon).



# TEJO serĉas volontulon!

*Kandidatiĝu por la venonta ofic-periodo!*

TEJO invitas vin kandidatiĝi por la posteno de plentempa TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo. TEJO-volontulo devas preti labori dum 10-18 monatoj (pli aŭ malpli longa daŭro esceptokaze ankaŭ eblas, ni preferas almenaŭ tutan jaron) ekde tiam, kiam la periodo de volontulado de la nuna TEJO-volontulo Aleks Baudry finiĝos, do ekde septembro 2010 (preciza dato laŭ interkonsento). Ne hezitu jam pli frue sendi mesaĝon al ni, se vi intencas volontuli.

TEJO strebas al tio, ke konstante estu TEJO-volontulo en Centra Oficejo, kiu povu dediĉi cent elcentojn de sia labortempo al TEJO. Esti volontulo signifas ne nur grave kontribui al la bonfarto de TEJO, sed samtempe signifas spertan pliriĉiĝon ne nur personan, sed ankaŭ movadan. La estraro limigas la dauron de volontulado al proksimume unu jaro, tiel ebligante al multaj akiri tiujn spertojn. Kiel volontulo vi certe lernos memstare labori kaj povas profundigi viajn spertojn en la sube menciitajn taskojn, se viaj spertoj estas bazaj.

La TEJO-volontulo ankaŭ dum kongresoj (IJK kaj UK) kaj TEJO-seminarioj estu la "vizaĝo" de la organizo, informante al membroj kaj aliaj interesatoj pri agado, aranĝoj, servoj ktp de TEJO.

La TEJO-volontulo laŭeble:

- havu tre bonan scipovon de Esperanto (legan, skriban kaj parolan)
- scipovu la anglan (scipovo de aliaj lingvoj estos pozitive konsiderata)
- ŝatu administran laboron
- estu sperta pri komputil-uzado (retpoŝto, interreto, tekstprilaborado, ktp)
- havu profundajn konojn de la junulara Esperanto-movado
- estu kapabla memstare preni decidojn
- estu preta aktive kunlabori kun la estraro de TEJO rilate al la ĝenerala funkciado de la organizo
- havu konojn de la eŭropaj junularaj strukturoj kaj eŭropaj instancoj

La laboro konsistas el:

- pritraktado de la poŝtaĵoj (paperaj kaj retaj) de TEJO
- prizorgado de la TEJO-arkivo
- administrado kaj prizorgado de kontaktoj kun eŭropaj kaj neeŭropaj strukturoj kaj organizoj
- aktiva subtenado de la agado de la estraranoj kaj komisiitoj de TEJO
- aktiva kunlaborado en la verkado de subvencipetoj
- aktiva kunlaborado en la aktualigo de la retpaĝoj de TEJO

La volontulo ricevas senpagan ĉambron en la CO kaj poŝmonon (nuntempe 115 eŭroj semajne), kiu sufiĉas por vivteni sin.
Kandidatoj sendu paperpoŝte al la Centra Oficejo aŭ retpoŝte al kaj oficejo ĉe tejo.org kaj gxen-sek ĉe tejo.org la jenajn dokumentojn esperantlingve:

- vivresumon (priskribantan viajn studojn, kursojn, spertojn ktp)
- motivigan leteron (priskribantan kial vi volas volontuli por TEJO)
- laŭeble pruvilojn de la supre postulataj kapabloj
- laŭeble rekomendleteron de ekzemple landa Esperanto-organizo.

**Grave:**

La volontulo devas esti individua membro de TEJO – tio signifas ankaŭ, ke vi havu malpli ol 30 jarojn en la momento de la eklaborado. Kiel minimuman aĝon ni konsideras 18 jarojn.
Momente TEJO-volontulo devas daŭre labori en la Centra Oficejo en Roterdamo. Nunaj kondiĉoj en Nederlando ne permesas al TEJO akiri labor- aŭ restad-permeson por necivitanoj de Eŭropa Unio. Tial la kandidato devas mem havi rajton laŭleĝe restadi dum la necesa periodo sur la teritorio de Nederlando.

## Ĝeneralaj informoj pri TEJO

*TEJO* estas mallongigo de *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*. Ĝi estas la junulara sekcio de *UEA, la Universala Esperanto-Asocio*.
TEJO popularigas internacian kompreniĝon per renkontiĝoj, edukaj programoj kaj uzo de internacia lingvo, Esperanto.
La organizo defendas kulturan riĉecon de lingva diverseco, homajn rajtojn de lingvaj minoritatoj kaj tutmondan kompreniĝon per facila aliro al internaciaj kontaktoj. Uzo de Esperanto estas kadro de niaj klopodoj.
TTT-ejo: www.tejo.org

## Centra Oficejo de UEA/TEJO

Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam - Nederlando
Tel.: (010) 436 1044
Faksilo: (010) 436 1751,
Retadreso: oficejo@tejo.org

## Estraro de TEJO

- Gregor HINKER gregor@tejo.org (Prezidanto, Eksteraj Rilatoj)
- Oleksandra KOVYAZINA sasxa@tejo.org (Informado, unua Vicprezidanto)
- Paulína KOŽUCHOVÁ paulina@tejo.org (Ĝenerala Sekretario)
- Irmina SZUSTAK irmina@tejo.org (Landa Agado, Vicprezidanto)
- Sergej TYRIN kasisto@tejo.org (Kasisto)
- Łukasz Maciej ŻEBROWSKI lukiz@tejo.org (Kongresoj, Seminarioj, Aktivula Trejnado, Vicprezidanto)

## Membroservoj de TEJO

Kiel membro de TEJO vi ricevas:
- la gazeton TEJO Tutmonde
- la revuon Kontakto
- rabaton por la Internacia Junulara Kongreso
- eblon partopreni en seminarioj
- eblon envolviĝi en interesa kaj internacia agado

Kaj tre grave: vi helpas al la junulara movado de Esperanto!
Se vi aĝas pli ol 30 jarojn kaj volas ĝui la samajn avantaĝojn (kaj revuojn) kiel membroj de TEJO, kaj aldone subteni TEJO-n, vi estas bonvenigata fariĝi Patrono de TEJO. (Pliaj informoj sur www.tejo.org/patrono aŭ de la Centra Oficejo).

## Agado de TEJO

La agado de TEJO konsistas precipe el:
- informado en junularaj medioj pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj pri ĝia solvo per Esperanto
- praktika utiligo de Esperanto je la servo de la junularo kaj informado pri tio en junularaj medioj
- okazigo de kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj kunvenoj
- instigado al la membroj de TEJO aktive partopreni en la Esperanta movado.
- Aktivula Trejnado (pli da informoj ĉe www.tejo.org/aktivula_trejnado)
- Eldono de Pasporta Servo (www.pasportaservo.org), la adresaro de gastigantoj kiuj pretas senkoste gastigi Esperantistojn; ĉiujare aperas ĝisdatigita eldono.

## Subtenu la agadon de TEJO

Ekzistas multe da ebloj helpi TEJO-n en sia agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi. Sed vi ankaŭ povas helpi al konkretaj agaderoj de TEJO. Mondonacojn al ĝenerala agado de TEJO bv. pagi al la UEA-konto "tejtej" (indiku celon de donaco, ekz: "donaco por KER" aŭ "donaco por landa agado"). Ankaŭ eblas donaci tiel por specifaj celoj:
- Fonduso "Partoprenu IJK-n" – TEJO per ĝi subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj al IJK
- Pasporta Servo – eble la plej fama eldonaĵo de TEJO

Por pliaj detaloj pri pagmanieroj, bv. rigardi ĉe www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

**TEJO dankegas vin pro via subteno!**